

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Semajna

Kun senpaga monata „Revuo“

Neŭtrala

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmendo, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko je germana banko.

La prezo de unu numero estas por la landoj:
Aŭstra 600 Kr. Ĉeĥosl. 1,20 Kr. Germana 20 Mk. Jugosl. 1,60 Din. Portugal. 0,50 Esk.
Belga 0,50 Fk. Finna 1,20 Fmk. (Germanoj) abono Kanada 0,06 Dol. Rumana 3 Lej.
Brita 3/4 Pc. Franca 0,50 Fk. (Ĉeĥosl.) abono Nederl. 0,15 Hfl. Sveda 0,24 Kr.
Bulgara 3 Levul. Hispana 0,50 Pes. Itala 0,70 Lir. Norvega 0,30 Kr. Svisa 0,20 Fk.
Dana 0,30 Kr. Hungara 20 Kr. Japano 0,10 Jen. Pola 80 Mk. U. S. A. 0,06 Dol.
Balikanoj kaj rusoj demandu la prezon ĉe sia Abonelo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0,50 Fr. Fk. aŭ 1 stampilan Respond-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4 Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0,10 svizan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 15 gmk); rabato laŭ interkonsento. Specialaj prezoj por eksterlandaj aŭ specialaj numeroj.

LEGANTOJ de ET
bonvolu ĉiam atente legi nian
Leterkeston
Es ĝi ni respondos mallajn mallongajn demandojn.

Numero 107 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 22. Oktobro 1922.

Granda Propaganda Parolado per Raditelefono.

Per aranĝo kun unu el la grandaj radi-firmoj en New York U. S. A. nia samideano s-o I. D. Sayers parolis 15 minutojn dum unu vespero per la radiotelefono pri kaj en Esperanto.

Tiu parolado estis unu ero de la ordinara programo, kiu estis presata ĉiutage en la tagjurnaloj.

Estas signifplene por Esperanta propagando, ke en New York 400000 personoj posedas radicevajn aparatojn, kaj la estro de la radi-firmo certigis s-on Sayers, ke laŭ modera kalkulo minimume 50000 personoj aŭskultis lian propagandan paroladon.

Tio certe estas la unua propaganda parolado pri Esperanto per radia telefono kaj la aŭdintaro estis la plej multnombra en la historio de nia movado. La raditelefona firma estas „The Westinghouse Electric Co.“ S-o I. D. Sayers estas en la stabo de la bonkonata tagjurnalo „New York Evening Post“.

Postsignoj de tro granda idealismo.

En nuntempa agado de Esperantistoj oni povas trovi multajn tiajn agemulojn, kiuj en Esperanta lingvo vidas ian internan spiriton. Per tiu spirito ili volas infekti tutan homaron. Komprenibile, tiu interna spirito estas ĉiam konformigata kun la humaneco, frateco, solidareco kaj similaj ecoj.

Estas klara afero, ke tiu speciaj stimuloj al la bonstato ne povas esti juĝataj kiel neaŭgaj por la homaro.

Tamen el tia idealismo lafoje naskiĝas ekstremeco. Ofte oni aŭdas: se Esperantisto ne havas suprenomitan internan ideon, se Esperantisto uzas internacian lingvon por siaj personaj aŭ bagatelaj bezonoj, — tiam tia homo ne havas la plenan rajton por portadi la nomon de fidinda Esperantisto, kaj estus pli bone, se en tiaj okazoj oni plu ne uzus la internacian lingvon.

Cu estas iom da senco en tia pensmaniero? Pripensante pli serioze ni aliros al alia konkludo. Ni ekvodus, ke inter Esperantistoj troviĝas idealistoj kaj realistoj, kiuj en kelkaj detaloj ne povas interkonsenti.

Konsiderante ĉiujn homojn de la mondo, la realistoj per sia nombro superas la idealistojn. Do realistoj plej ofte ne tenas fikse en sia kapo iajn internajn ideojn pri la humaneco, ameco, frateco, egaleco ktp. Ekzemple por ordinara komercisto estas plej grava tasko plivastigi komercajn aferojn, por scienculo — ekkoni novajn direktojn de lia specialeco, por agronomo — agrikulturaj aferoj, por instruisto — instruada arto, pedagogio ktp.

Cu efektive ĉiuj tiuj ĉi homoj ne havas moralan rajton uzi internacian lingvon por siaj „bagatelaj“ aferoj?

En nuna tempo ankaŭ inter diversaj ŝtatoj, politikaj kaj ekonomiaj organizaĵoj ofte okazas konferencoj aŭ kongresoj. Se en tiu speciaj konferencoj la anoj de diversaj nacioj uzus la unu-komunan internacian lingvon, t. e. Esperanton, por pli bone kompreni unu la alian, — ĉu en tia okazo la Esperantismo devas esti gvidanta kondukilo de la partoprenantoj?

Se Katolika Internacio akceptis Esperantan lingvon, tio ankoraŭ ne signifas, ke katolikoj estus akceptintaj tutan internan spiriton de Esperantismo kun ĉiuj ĝiaj atribuoj. Katolika Internacio akceptis Esperantan lingvon, kiel al mi ŝajnas, ne por nura disvastigo de Esperantisma spirito aŭ idealo, sed por havi pli bonan rimedon por la efektivigo de katolikaj ideoj en tuta mondo. Al ili Esperanta lingvo estas parto de tiu ilo, per kiu ili volas atingi sian celon. Parolante pri la katolikoj, tion saman oni povas diri pri aliaj religioj, sektoj kaj tufmondaj organizaĵoj: socialistoj, anarĥistoj, komunistoj ktp., por kiuj estas necesa komuna ilo de interrilatoj.

Komprenibile, povas ekzisti tiaj homoj, kiuj povas pensi, ke Esperantan lingvon oni povas uzi nur por disvastigi specialan idearon de Esperantismo, t. e. de tia Esperantismo, kia ili ĝin komprenas.

Kiel ajn estus pravaj Esperantismaj ideoj, tamen per ili en nuntempaj cirkonstancoj oni ne povos infekti tiujn homojn, kiuj jam havas siajn ideojn de internacia karaktero. Kia ajn politika aŭ ekonomia organizaĵo ne ŝanĝos siajn ideojn por aliaj ideoj.

El tiuj ĉi konsideroj eliĝas la konkludo, ke ne estas ia ajn bezono transformi la Esperantismen en apartan religion, sektion aŭ filozofian skolon. Kiel Esperanta lingvo ne forigas aŭ ekstermas nacian lingvon, tiel ankaŭ Esperantismo ne povas forigi aliajn homajn idealojn. Kiam

diverslingvaj homoj komencos uzi por siaj interrilatoj kaj komunikvojoj unu neŭtralan internacian lingvon, aŭ kiam diversaj ŝtatoj por siaj eksteraj kaj internaciaj aferoj akceptos Esperanton, — tiam Esperanta lingvo donos eblecon al homoj ekkoni kaj trovi novajn vojojn de bonstato, kaj tiamaniere pli kulturigi homojn pli baldaŭ alvenos al tiu konvinkigo, ke vivo de la homaro sur la tero povas esti sen milito kaj simila maljusteco.

Pli da praktikeco — jen estas nia nuntempa devizo, kiu plifortigas post serioza pripensado. La mondo tiam akceptos nian internacian lingvon, kiam ĝi estos konvinkita, ke sen internacia lingvo ne estas ebla la plua evolucio de kulturo.

A. Klimas.

Militado neniam plu.

De W. D. Hamblyn (Anglujo).

Multaj publicistoj kaj ĵurnalistoj vigle emfazas la terurecon kaj malsaĝecon de militado moderna — speciale la potencajn terurojn de venena gaso kaj la timigajn eblecojn de sciencia detruado de batalantoj kaj ankaŭ ne-batalantoj en milito estonta.

Kvankam la publikigo de ĉi tiuj pensoj estas sendube necesa, speciale pro ĝia alvoko al laj mensoj homaj, ni devas senti, ke tio, kio emigos senigi la regadon de la forto, ne estas tiom la teruro kaj suferado de militado, kiom la vekigo de la homa konscienco pri la enstanta maljusteco de la militado.

Nur per pozitiva potenco de prudento kaj bonvolo ni povas malhelpi la negativan potencon de timo kaj malamo reganta la agadon homan.

Kiam homoj klare realigos la veron videblan, ke militado estas krimo kontraŭ humaneco, kiam ili komprenos plene la fundamentan faktan, ke en neniam cirkonstancoj milito povas esti justa aŭ prava; kiam oni kutimiĝos al la ideo, ke paroli pri justa milito estas kontraŭlogike, tiam kaj nur tiam post fortaj konvinkoj oni certe rifuzos partopreni en la alvoko de besta forto.

Imagu, ke estu eble por la diplomatoj, la militistoj kaj la financistoj, kiuj kune kaŭzas militojn, estu la solaj batalantoj, tiam militon oni povus nomi justa, laŭ la senco, ke la farintoj de la malpaco devus ĝin finbatali. Eĉ tiam oni ne povas ĝin nomi justa, ĉar, laŭ la Krista diro, ĉiun alvokon al forto fizika oni devas juĝi malĝusta.

Tamen, ĉar milito, en kiu la farintoj estus la solaj kunbatalantoj, estas plej nekredibla, ni daŭrigu la tezon.

La vizaĝo de la longbarba sinjoro longiĝis je ĉi tiu evidenta mensogo. La instruisto turnis sin al li, dirante:

„Li eĉ ne havas patrinon; li estis tute malgranda bubeto, kiam ŝia patrino mortis. Nun la vilaĝanoj lin nutras laŭvice, ĉiuj lin amas, ĉar cetere li estas bona knabo kaj tre amuze povas mensogi.“

La inspektoro longe lin rigardis severe kaj diris:

„Sed, knabeto, ci jam estas sufiĉe granda por konsideri, ke neniu povas vivi per mensogo. Eĉ Dio tre severe punas mensogulon. Malkutimigu de tiu malbona eco. Rigardu, ĉiuj kamaradoj neniam mensogas, kial do ci faras tion? Estus pli bone lerni la lecionojn, ĉar tiel ci fariĝus diligenta, saĝa homo.“

„Ĉiun lecionon mi lernas,“ diris Mensogeĉjo kun pentema mieno.

„Ĉu vere? Nu, se estas tiel, diru al mi, ĉu ci jam ion aŭdis pri la reĝo Matiaso la Justa?“

„Jes.“

„Nu, rakontu ion pri li.“

„Hierau, mi iris en la arbaron (ekauĉiĝis mallaŭta ridado, ĉar en la ĉirkaŭaĵo de nia vilaĝo entute ne estis arbaro), kaj tie sur ĉiu arbo estis skribita per kredo: „Ci tie estis la reĝo Matiaso“, kaj al lasta arbo estis ligita la urbestro de Kolojvaro; kaj la reĝo Matiaso lin batis per dika knabostono, ĉar li ne permesis al mia kara patrino kolekti sekajn branĉojn en la arbaro.“

Ni faladis por rido dekstren kaj maldekstren. La lerneja ordo plene renversiĝis, ni ridis, ridegis, frapadis la librojn; la inspektoro kaj la instruisto ankaŭ ridegis, nur la eta Mensogeĉjo restis serioza kaj rigardis antaŭ sin, kvazaŭ la puran veron li estus dirinta; poste vidante la sukceson atingitan, li komencis rideti.

La vizito estis tiel amuza, ke la lernejinspektoro sentis, ke kontraŭ Mensogeĉjo li ne povos konservi sian seriozecon. Ili ambaŭ ne povas resti kune en la ĉambro; sekve li forsendis Mensogeĉjon, ordonante, ke post la instruflino li restu ankoraŭ, ĉar li parolos kun li.

Komprenibile ni estis tre scivolaj, kion diras la inspektoro al Mensogeĉjo post la instruflino. Felice la instrustedzino tenis lin por ĉerpi akvon el la puto, ĉar nun, kiam la tuta lernantaro estis okupata, ŝi ne havis helpanton. Tiamaniere nia Mensogeĉjo efektive ĝisatendis la finon de l' instruo, kaj estis sendata al la inspektoro. Ni ne povis disiri. Antaŭ la pordego ni atendis are, kio okazos kaj kiel elvenos Mensogeĉjo. Fine li venis. Serioza li estis kaj trankvila, venante el la koridoro.

„Nu — insulton li ricevis,“ ni konstatis ridante je li.

Sed kiam ni ĉirkaŭprenis kaj atakis lin per cent demandoj, li montris denove la antaŭan, ruzokulan, mensogulan mienon kaj komencis rakonti:

„Aŭskultu la lernejinspektoro min vokis, ĉar li volis rekompenci min pro la bona ridigo. Li diris, ke ĉiam mi konduku same; poste li donacis al mi oranĝon kaj la instrustedzino glason da kafe kaj dolĉan bulkon. Mi restis longe, ĉar ĉion ĉi mi devis manĝi.“

La aŭdantaro parte ridis, aliaj kredis al li.

„Ĉu vi kredos aŭ ne: krom tio li donis al mi dek krejcerajn je memoro.“

„Montru! montru! kie ili estas?“

Mensogeĉjo komencis serĉadi en la poŝoj, rapide sereniĝis lia vizaĝo:

„Jen kiel, mi jam elspejis ilin en la butikoj. Susanino Kovaĉ ankaŭ mangis de la sukeraĵo, klun mi aĉetis.“

De post Carlyle parolis sian faman diron kontraŭ militado, multaj militoj okazis, sed la fundamenta justeco de lia argumento ne estas malpruvita: „Ĉu ĉi tiuj inter si malpacigiĝis? Okupata kiel la diablo estas, ili ne havis la plej malgrandan malpacon. Longa interspaco apartigis ilin, ili estis tute fremdaj; ja en tiel vasta universo, troviĝas senkonscie kunhelpo inter ili pro komercio. Kiel do? Simplulo! Iliaj regantoj malpacigiĝis kaj anstataŭ pafi unu la alian, ili havis la ruzon por igi ĉi tiujn bubojn sin interpafi.“ („Sortor Resartus.“)

Ruskin sciis sian malakordon pri militado. Mi sugestas, ke tiu malakordo estis pro tio, ke en mezepoko militado ŝajnis al li provo de militema vireco, sed la notindaĵo estas, ke li konsentis al Carlyle, kaj citante la eliraĵojn supran, diris, ke Carlyle estas unu el la plej grandaj pensintoj anglaj.

Neniu povas serioze konstati, ke moderna militado estas, laŭsence, provo de militema vireco. Estas verdire maljusta mortigo sur grandega kampo, mortigo per maŝinaro, venena gaso, kaj per ĉiu malnobla kaj dlabla rimedo imagebla! La kunbatalantoj moviĝas kiel ŝakosoldatoj, en barakado por politikaj celoj, kiujn ili ne decidas kaj ne aprobus, se ili sciis la celojn.

Ĉiufianke preteksto estas necesa, por devigi homojn submeti sin sub tiajn spertojn terurajn: sekve, kaŭzoj estas kutime trovataj por la justeco de la milito kaj la absoluta devigo ĝin decidi batali. Ĉiu lando vice konsideras sian kaŭzon justa; kaj ĉiuj ŝajnas esti plenposedataj de la ideo, ke armiloj sole decidus tion, kio estas vere politika disputo.

La maljusteco de la militmetodo montriĝas klare al ĉiu, kiu studas ĝiajn kaŭzojn. Laŭ la supozo de la eikoj de homrilatoj milito estas mortigo: kaj milito nuntempa estas mortigo per anstataŭigo, ne de la malmultaj, kiuj kaŭzas militadon, sed de la multaj, kiuj havas nenian deziron mortigi unu la alian. La enstanta maljusteco de tia metodo estas klara kaj senduba. La popoloj de la diversaj nacioj ne volas malpacigi kaj malami reciproke kiel la enloĝantoj de malsamaj urboj en unu lando.

Se la demokrataro havas nenian kaŭzon por interbatali, nek celoj malsamaj estas minacataj, kial ili jesas fervore la deziron kaj la postulojn de potenciaj grupoj, kiuj regas? Ni sugestas, ke tio fariĝas, ĉar oni trompas ilin; ili kredas la argumentojn, kiujn ĉiu regno vice uzas, ke la milito estas tute defenda. Historie ni povas pruvi,

Per tio la afero finiĝis. Susanino Kovaĉ ĝuste kuŝis malsana, ŝi tute ne estis en la lernejo.

Same nia Mensogeĉjo parolis ĉiokaze, eĉ erare li neniam diris la veron.

Sed malbonintence li ne mensogis, nur ŝerce. Eterna ŝerco estis lia vivo, tial oni amis lin, kaj ankaŭ tial, ĉar por li estis ŝerco preni sur sin ies kulpon.

Ankaŭ mi kun danko kaj amo rememoras unu lian bonfaron. Li estis ĉe ni dum vintra posttagmezo. Ni ludis en la malgranda ĉambro. Tie staris ankaŭ la ŝranko kun porcelanaĵoj; kaj foje pro malatento mi dejetis la plej ŝatan kafotason de mia avino. Ŝi tiom satis ĝin, ke neniam ŝi trinkis el alia taso kaj diradis al ni infanoj, ke ŝi ekmalŝanĝis, se ĝi okaze rompiĝus.

Kaj jen, ĝi rompiĝis, je kvar-kvin pecoj ĝi kuŝis sur la planko. Mi paligis pro granda ekstimo; en la ĉambro estiĝis mortŝilento. En alia ĉambro la avino aŭdis la ekfinton kaj tuj poste la mutiĝon. Kun minacanta mieno ŝi alkuretis:

„Kio okazis?“

Vidante la rompaĵon kaj mian senkoloran vizaĝon, tuj ĉion ŝi divenis.

„Kion ci faris?“ ŝi diris laŭtvoĉe.

Jen intervenis Mensogeĉjo:

„Mi faris tion,“ li diris mallaŭte, „mi volis montri, ke mi povas teni la tason sur mia nazo same, kiel en cirko la jonglisto.“

Li levis sian malpintan nazeton aeren kaj per ambaŭ manoj montris, kiel li volis balanci la tason.

Estis tiel komike, tiel ridige, ke tuj la avino ekridetis kaj „rompis nukson“ sur lia kapo. Sed mi vidis, ke ĉion ŝi scias, kaj samtempe Mensogeĉjo ricevis kafon, ne mi. Poste, kiam li foriris en sia malnova, de plenaĝulo heredita surtuto

Mensogeĉjo.

De Sigmundo Moricz.

Allan nomon ankaŭ havis mia malgranda kamarado „Mensogeĉjo“, sed tiun jam mi ne memoras. Ni nomis lin ĉi tiel, ĉar neniam li diris la veron. Kaj se oni tre riproĉis lin pro iu granda mensogo, li klinis sian obstinan kapeton, kutime nur balbutante:

„Mi ne mensogas.“

„Sed kion do?“

„Mi nur mensogetas.“

Post multaj mensogetoj restis lia nomo: „Mensogeĉjo“. Eĉ la instruisto vokis lin tiel:

„Nu, Mensogeĉjo, ĉu ci scias la lecionon?“

Je kio li kutime respondis:

„Mi scias.“

Kvankam li sciis eĉ ne unu lecionon, tamen eĉ post la plej malfacila demando li sukcesis elmensogi sin, ĉar tion li scipovis je ĉies admiro.

Ankaŭ la lernejinspektoro veninte kontroli la lernejon, komencis per la vortoj:

„Nu, mi vidu, kie estas la fama mensogulo!“

Nia kamaradeto starigis, sur lia hirta kapo al cent direktoj staris la vilaj haroj, kaj tiel komike li grimaciĝis sian malpintan nazon, ke ni ceteraj tuj komencis kaŝridi. Ankaŭ la instruisto ridetis sub la lipharoj, nur la lernejinspektoro restis serioza.

„Ĉu ci estas tiu? Nu, kial ci ne kombis matene la harojn, knabo!“

„Mi kombis ilin“, li mensogis tute serioze. Dum ni gaje atendis la sekvojn.

„Ne mensogu!“ diris la inspektoro, kiu ankoraŭ ne kutimiĝis al interparolo kun Mensogeĉjo.

„Sed vere, mia patrino min kombis, ŝi havas oran kombilon, kiun ŝi ricevis donace de la reĝo.“

ke en preskaŭ ĉiu milito, kie lando batalis, la mensogo eldoniĝis en tiu lando, ke la milito estas nur defenda.

La ekonomiaj efektoj de la Granda Milito pruvis konkluzive, ke eĉ de vidpunkto ekonomia haoso en unu lando produktas ĝin en aliaj.

Mi penis pravi la enstantan maljustecon de la metodo milita, por elmontri la gravecon de la individua sintenado kontraŭ militado. Oni ne devas kontentiĝi sole subteni morale la Ligon de Nacioj, sed ni devas subteni ĉiun organizadon, kies celo estas la nuligo de militado.

Sinjoro J. M. Barrie kuraĝe avertis la junulojn de Britujo, ke se ili ne sin gardas, la maljunuloj trompus denove ilin; kaj plue li diris, ke la maljunuloj repaŝas en la malnovan vojon! Ni akceptu lian averton, kaj uzu ĉiujn fortojn por instigi la homojn, por ke ili realigu la grandegan malsaĝecon de la metodo milita.

La graveco de la individua sintenado ne povas esti troigata, kiam ni rememoras, ke nacio nur estas aro de individuoj. Se troviĝas en ĉiu lando forta malplimulto promesita al la nuligo de militado — homoj, kiuj konvinkiĝis pri la enstanta maljusteco, malsaĝeco kaj frenezeco, decidus, ke en neniam cirkonstancoj ili alprenu armilojn — tiam, en tempo de krizo ilia sintenado kaj konduto instigus la estantajn apatulojn kaj la indiferentulojn. Tiu sintenado bezonas multe da kuraĝo kaj grandan fidon, sed la horo jam alvenis por forta klopodo por liberigi la homaron de la malbeno de militado. Estas movadoj nun, kiuj devigas nin kredi, ke la homaro fine ekmarŝas sur la vojo, kiu kondukas al la nuligo de tiu ĉi maljustaĵo. La individua respondo kreskas, kreskados proporcie, kiel homoj realigante la absolutan maljustecon de perfortaj metodoj en internaciaj aferoj, konvinkiĝos, ke la esenca fundamento estas prudento kaj bonvolo, kiel la sola fundamento, kiu fine kondukos al la unueco del homaro.

Ekspozicio de la Intelekta Laborado.

Letero el Genève.

Genève, 22. 9. 22.

Interesa ekspozicio estas malfermita antaŭ kelkaj tagoj en Genève — la Ekspozicio de la Intelekta Laborado. Ĝi trovis azilon en belega apudurba parko „des Eaux Vives“. La ekspozicio estas modesta, tre modesta, kiel la intelekta laborado mem. Modeste pendas sur muroj de la parka teatroj tabuloj, kies pentraĵoj klare montras al vi la rezultojn, la praktikajn metodojn, la progresojn de la intelekta disvolviĝo. Ĉiuj estas tabuloj de „Svisa federacio de intelektaj laboristoj“, de „Libera instruado“, de intelektaj labor-



Varsovia Delegitaro de UEA.

Sidantaj: K. Domostawski, St. Karolczyk, Ad. Oberrotman.
Starantaj: Wl. Miernicki, A. Hartman.

istoj ĉiuspecaj. Ĝojindaj estas bildoj kaj tabuloj, kiuj montras la emon internaciigi la intelektan laboradon, kunigi la individuajn, la naciajn mensajn laborojn en unu grandegan penadon je la gloro kaj utilo por tuta homaro.

La Ligo de Nacioj kaj la Internacia Laboroficejo estas ankaŭ reprezentataj per siaj sciencaj laboroj.

Multe da interesinda ni ekscias tie pri la libro, tiu potenco faktoro, grandega montrilo de la rezultoj, de la penoj de homara pensado. Interesinda estas la komparo de la kreskado de la disvastigo de libro: en la jaro 1436 aperis nur unu libro. En la jaro 1908 aperis 190999 libroj. La unua rango en la libroproduktado apartenas al Germanlando, kiu aperigis dum la periodo 1901 ĝis 1908 288512 librojn, dume Hispanio nur 22370. Bedaŭrinde la milito estis malfavora ankaŭ por la libroproduktado. Sed ankaŭ tiam Germanlando okupas unuan lokon, aperigante en la jaro 1920 32346 librojn. Kiel la lasta sekvas Norvegujo kun 949 libroj. Ĉio en la ekspozicio instigas al la penso, kiom multvalora estas kaj estos tutmonda kooperacio ankaŭ en la regiono de la intelekta laborado. En tiu rilato interesindaj estas ankaŭ la tabuloj de la „Internacia Kuniĝo por la protektado de literaturaj kaj sciencaj verkoj“.

En Esp. fako ni vidas ankaŭ la feste vestitan 100. numeron de „Esperanto Triumfonta“.

Grandan intereson prezentas tabuloj, ellaboritaj de la konata aŭtoro de populsciencaj kaj bibliografaj verkoj, D-ro Nikolaj Rubakin. Ili montras al ni la rilatojn inter la aŭtoro, la libro kaj la leganto kaj ilustras majstre la novan fakon de la aplikata psikologio — la psikologion bibliografian. La sekcio de ĉi tiu branĉo de la psikologio estis malfermita 20. okt. en la jaro 1916 ĉe la „Institut J. J. Rousseau“ en Genève kaj ĉe la „Institut International“ en Bruxelles. Kiel direktoro de tiu sekcio estis nomita D-ro Rubakin, kies eltrovoj kaj laboroj en tiu scienco estas tre interesindaj. La ŝatata verkisto de multaj populsciencaj broŝuroj kaj libroj laboras jam multe da jaroj en sia grandega biblioteko, vera trezorejo de la homa pensado, kie i. a. estas konservitaj ĉiuj verkoj el rusa literaturo, eble malofte trovataj nuntempe eĉ en Ruslando mem. Mi esperas en alia artikolo pli detale rakonti pri tiu ĉi admirinda sperto de legantara psikologio. Nun mi klarigos ĝin nur per surskriboj sur la tabuloj, senditaj en ekspozicion per D-ro Rubakin. La fundamenta regulo de la bibliografika psikologio estas: la libro estas la leganto mem. Trovi la rilatojn inter la libro kaj la leganto — estas grandega rimedo — per la libro, la plej potenco faktoro de la intelekta laborado, vekl kaj eduki en la legantaro deziratajn ideojn kaj sentojn. Tial „la bibliopsikologio devas pliligi, plibonigi ordigi la plej bonajn verkojn literaturajn kaj sciencajn“.

Tial la biblioteko ne devas nur esti konservejo de libroj, sen vivaj aĵoj. Kontraŭe, „la bibliotekisto estu amiko, konsilanto de la leganto. Li estu la animo de la biblioteko, ne aŭtomata disdonisto, estu semanto energia kaj arda de noblaj ideoj kaj sentoj“.

Kompreneble tiun altan rolon de la libro, ni resumas la raporton pri la ekspozicio de la intelekta laborado per la vortoj de Rubakin, vortoj, kiuj servas al li kiel „moto“ en liaj bibliopsikologiaj eltrovoj: „Vivu la libro, tiu potenco ilo en la batalo por la vero, por la justeco!“

Alexandra Mexin, Genève.

INTERESAJN ARTIKOLOJN lerte akribitajn, kiuj koncernas nian movadon kaj aferojn de ĝenerala intereso NI NUN BEZONAS POR ETI!

kvazaŭ malgranda koboldo, la avino diris al mi: „Tiu Mensogeĉjo estas pli bona ol ci.“

Kaj el ŝia voĉo sonis tiel profunda riproĉo, ke la tutan nokton mi ploris. Sed Mensogeĉjon ankoraŭ pli multe mi amis. Amis lin la tuta vilaĝo. De mano al mano oni sendis kaj rakontigis lin. Dum malzensebligado, en ŝpinejo li estis la plej grava persono. Liaj amuzaj ekpenoj estis neelĉerpeblaj, tiom pli, ĉar li lernis la aferojn de plenaĝuloj kaj mensogadis pri fraŭloj, fraŭlinoj ĉiuspecajn malsaĝojn. Rekompenco oni nutris lin kiel birdon, per ĉio, kion liaj buŝo kaj okuloj povis ekdeziri. Krom tio oni penis plaĉi al li, ĉar, kvankam per sendanĝeraj ŝercoj, sed tre bone, li povis ridindigi ĉiun ajn.

Estis en la vilaĝo ekstreme avara virino. De ŝi nur malofte li ion ricevis, maksimume rostitan terponon, kiun jam neniu volis manĝi. Post tia tagmanĝo mia kamarado iris fole en la ŝpinejon. Li paroladas, paroladas lekante la lipojn kiel hundeto, kiu manĝis ion bongustan. Fine tiu diras: „Ŝajne ci tagmanĝis hodiaŭ tre bone.“

„Jes, tre bone.“

„Nu, ĉe kiu?“

„Ĉe mastrino B. Mi manĝis tri telerojn da manĝaĵoj, tial mi lekas ta buŝon.“

„Nu, rakontu, kio ĝi estis?“

„Unue: supo el bona, freŝa, pura akvo, due: hieraŭ bakita terpono, trie: rostajo: antaŭ tri tagoj bakita kukurbo.“

Eĉ nuntempe oni diras ĉe ni, se malestas bona tagmanĝo: „Post tio ankaŭ Mensogeĉjo lekas siajn lipojn.“

Malfeliĉa Mensogeĉjo! Oni ne antaŭscias, kia sorto lin atendis. Vents, terure malvarma vintro, treblante la ĉifonvestaĵon de la orfa knabo. Li malsaniĝis je brulumo kaj post naŭ tagoj certe jam amuzis la anĝelojn, enpaŝante al ili kun sia

malpinta, mensogpreta nazeto. Lia lasta vorto estis inda je lia tuta vivo. En granda febro, malgrasiginte, kun rigidaj okuloj li kuŝis. Ĝus mi estis lin vizitanta. Apud li staris la edzino de l' vilaĝestro, kiu flegis la malsanuleton.

„Kiel ci fartas, mia knabo?“ ŝi demandis. — Ankoraŭ unu fojon li turnis al ŝi la petolajn okulojn:

„Ĝus estis ĉi tie mia patrino kaj alportis por vi orŝpinilon, orbobenon, orkanabon — jen ili kuŝas en la apuda ĉambro.“

Al la oknolino larvoj fluus el la okuloj, kaj ŝi iris en la apudan ĉambro, por rigardi la orŝpinilon, orbobenon, kaj orkanabon. Kiam ŝi revenis, la kompatinda Mensogeĉjo ne mensogis plu.

Kara kamaradeto, kiomfoje ni rememoras cin! — Kvazaŭ li ankoraŭ vivus kaj estus restinta sama, kia li estis. Kaj kiam en la ŝpinejo oni scias nenion rakonti, kiomfoje oni diras:

„Ho! se Mensogeĉjo estus ĉi tie!“

El la hungara lingvo tradukis Kal-Mano (Kapa).

Stranga sonĝo.

De D-ro Joh. Ev. Schweiker.

Dum varmega somertago mi kuŝis en la ombro de pomujo ripozante. Baldaŭ mi ekdormis kaj havis jenan sonĝon:

Mi staris sur la supro de alia monto kaj rigardis en vastan kampon, kie granda batalo okazis inter Francoj kaj Angloj unuflanke kaj Germanoj Aŭstroj aliflanke. Mi aŭdis bone la bruegon de la kanonoj kaj la kriegojn de la batalantoj. Mi vidis la faladon de soldatoj kaj ilian reciprokajn mortigadon.

Apud mi staris alia homo, kiu ankaŭ rigardadis la kruelan batalon. Li estis Hinduo kaj ano

Novajservo de la Internacia Labora Oficejo.

La Ligo enradikiĝas.

Taŭga hejmo por la Internacia Labora Oficejo.

Frappanta pruvo, ke la Ligo de Nacioj enradikiĝas, kaj ankaŭ de la stareco nun atribuita al tiu institucio, troviĝas en la fakto, ke la Kvara (Buĝeta) Komitato de la Tria Kunveno de la Ligo de Nacioj nun kunsidanta en Genève, decidis rekomendi la voĉdonon de 5000000 svissaj frankoj (ĉirkaŭ 120000 funtoj sterlingaj) por konstrui daŭran hejmon por la Internacia Labora Oficejo.

La decido de la Komitato estis unuanima, kaj pluraj membroj forte kritikis la netaŭgecon de la nuna loĝado de la Oficejo en eksterurba konstruaĵo, kiu ne sole ne estis konstruita por servi kiel oficejo (ĝi estis lernejo antaŭ ol esti ludonata al la Internacia Labora Oficejo), sed estas tute nesufiĉa por loĝigi la estantan personaron.

La loko de la nova konstruaĵo estas en lagorda bieno malavare prezentita fiacele de la Svisa Federacia Konsilantaro. Proksime al la Oficejo de la Ligo, kun fronto sur la akvorando, tiu ĉi terpeco estas taksita je 1200000 frankoj, kaj donas okazon por konstrui hejmon indan je la granda tasko de internacia reguligo de labor-kondiĉoj.

La planoj de tiu ĉi nova oficejo estos elektitaj per publika konkurso, sed, vidante, ke urĝas komenci kiel eble plej baldaŭ, nur svissaj arkitekturistoj konkurso. Definitive decidis tamen internacia komitato de arkitekturistoj.

Oni invitos ĉiun ŝtatan membron de la Internacia Labora Organizo kunlabori por fari tiun ĉi konstruaĵon la plej alta ekzemplo de internacia elfarado, sendante siajn plej bonajn konstrumaterialojn kaj artajn produktaĵojn. La Japana Delegito jam diris, ke li ne dubas, ke lia Registaro kunhelpos al la ornamado en maniero inda, tiel je Japanio kiel je la Internacia Labora Oficejo.

La vivo de la Laboristoj en Venezuelo. Parolado de la Liga Delegito en la Internacia Labora Oficejo.

Sinjoro Cesar Zumeta, Venezuela Delegito al la Tria Kunveno de la Ligo de Nacioj, nun kunsidanta en Genève, ĵus faris al la personaro de la Internacia Labora Oficejo paroladon pri labor-kondiĉoj en Venezuelo.

Sinjoro Zumeta, kiu estas unu el la plej eminentaj personoj en Latina Ameriko, jam reprezentis sian patrujon en multaj Internaciaj konferencoj. Li ĉeestis la Trian Internacian Laboran Konferencon lastan oktobron, kiel Venezuela Delegito kaj partoprenis aktive en la diskutadoj kaj decidoj. Li tiam forte esprimis la specialan intereson de sia patrujo pri la temoj tuŝantaj la bonstaton de kamparlaboristoj, kiujn la Konferenco konsideris, kaj la aprobon de lia Registaro pri la laborado de la Internacia Labora Organizo por tiu celo.

Sinjoro Albert Thomas, Direktoro de la Internacia Labora Oficejo, bonveniginte s-on Zumeta, diris, ke unu el la plej komplikitaj problemoj por la Internacia Labora Oficejo, estis la konserveco de efikaj rilatoj kun la grandaj landoj de Sud-Ameriko. Estis per tiuj paroladoj kiel tiu farota de s-o Zumeta, ke la personaro de la Oficejo povus kompreni la estantajn kondiĉojn en tiuj landoj kaj la problemojn, kiujn ili devas trakti.

S-o Zumeta espriminte sian grandan ŝaton kaj intereson pri la Internacia Labora Oficejo, skizis rapide la historion de Venezuela industrio de la fruaj tagoj, kiam la orserĉado estis la sola aktiveco. Poste li vive rakontis la plibonigon en terkulturaj kaj industriaj kondiĉoj, priskribante la diversajn klasojn de laboristoj kaj aludante la problemon de enmigrado.

de Buddha-religio. Kortuŝite pro la terura spektaklo li diris al mi:

„Kiun religion havas la batalantoj?“

„Ili estas plejparte kristanoj.“

„Kristanoj? Mi ĝis nun neniam aŭdis ion pri tiu ĉi religio. Kio estas la esenco de la kristana konfeso?“

„La kristanoj havas kiel ĉefpostulon: „Amu Dion super ĉio kaj ĉiun homon same kiel vin mem!“ Tiel ordonis Kristo, la fondinto de tiu ĉi religio.“

Nun okazis io, kion mi ne estis atendinta. La Hindu fikse rigardis min kelkajn sekundojn; poste li laŭte ekridis kaj ridegadis, tiel ke li kurbigis.

Post iom da tempo li fine diris:

„Ili devas ami ĉiun homon, same kiel sin mem, kaj nun ili kruelege mortigas unu la alian! Vi neniam min kredigos, ke tiuj ĉi militistoj estas kristanoj!“

„Kaj tamen estas tiel! Ili havas multajn kristajn preĝejojn kaj predikistojn,“ mi obstine asertis. „Nu, do klarigu tion al mi, mia frato!“ respondis la Hinduo.

„La estroj de la militantaj kristanaj ŝtatoj ordonis siajn soldatojn, ke ili iru en la militon, kaj la soldatoj obeis, kio estis ilia devo.“

„Tio ne estis ilia devo, se ilia religio tion malpermesas! Cetere, ĉu la estroj de tiuj ĉi kristaj ŝtatoj ne estas ankaŭ kristanoj?“

„Ili diras, ke ili estas kristanoj; sed ili tamen militas.“

„Do ili ne estas veraj kristanoj! Kial la kristaj ŝtatoj ne elektas por si verajn kristanojn kiel siajn estrojn?“

„Mi ne scias tion.“

„Sed mi scias tion!“ li fervore ekkriis, kaj daŭrigis: „Ĉar la subuloj estas aŭ malsaĝuloj, aŭ mem ne veraj kristanoj! Ĉiukaze ili ne

S-o Thomas varme dankante al s-o Zumeta pri ties sciganta parolado, diris, ke la idealo de la Internacia Labora Oficejo estas la plej bona uzado de la provizoj de la mondo sub la plej bonaj kondiĉoj de vivo kaj laboro por la laboristoj de la mondo.

Rim. de la Red. La Internacia Labora Oficejo ĉe la Ligo de Nacioj ne dubante pri la valoro de Esperanto deziras utiligi ĝin por konatigo de siaj sciigoj de komuna internacia intereso. Tial ĝi nun eldonas ilin ankaŭ en Esperanto. Volonte ni represas ilin de tempo al tempo kaj insiste petas niajn legantojn trudi la artikolojn en siaj gepatraj lingvoj por represo en naciaj gazetoj. Ne ĉiam necesigas kompleta laborita traduko; ofte sufiĉas mallongigita elĉerpajo. Ĉefa afero estas, ke tio ĉiam estu farata baldaŭ, pro aktualeco de la artikoloj. Oni ankaŭ aldonu la rimarkon: „Lia Esperanto Triumfonta“.

Gazetojn kun la artikoloj oni ĉiam tuj sendu al ni, por ke ni povu sendi ilin kune al la Labora Oficejo.

La skolta movado kaj tutmonda paco.

La skolta movado estas unu el la movadoj, kiuj laboradas kontraŭ la detruiga spirito de milito; tamen multaj personoj ankoraŭ opinias, ke ĝi estas pure milita movado, por la edukado de la gejunularo pri militaj aferoj. Tiu opinio estas tute erara, kaj senescepte ĝi estas la opinio de tiu, kiu scias nenion, aŭ almenaŭ tre malmulte pri la internacia organizacio kaj celaro de la skolta movado. Kiuj senpense asertas, ke knaboskoltoj estas junaj soldatoj, tiuj estas tre maljustaj kaj devus ne esprimi sian opinion, antaŭ ol ili honeste estas studentaj la regularon kaj metodojn de la skoltaj estroj, kaj speciale la celojn de la fondinto de la movado en Granda Britujo, Lia Kavallira Moŝto, Baden-Powell, K. C. B., ktp.

Kiu estas vera skolto kaj scias plej bone la celojn de la skoltoj, tiu malatentas la dirojn de senpensuloj, kiuj asertas ĉiujn absurdaĵojn pri ĉiu movado, kies ĉefa celo estas la tutmonda paco, — tiuj senpensuloj, kiuj diradas, ekzemple, ke Esperanto estas pure kaj nure bolŝevika propagandilo, ilo por mallernemigi la ordinaraĵajn homojn, ktp.

La skolta movado tute ne estas militista movado — skoltoj ne portas pafilojn, ne ekzercas militon, ne portas militan uniformon — ne estas ligita (almenaŭ en Britujo) kun la militistaro, fakte ne faras ion, kio estas militista.

Tralegado de la skolta promeso kaj la dek skoltaj leĝoj (sur kiuj estas bazita la tuta skolta programo) konvinkos ĉiun ajn pri la pure pacaj celoj de la movado.

Mallongigite la dek leĝoj estas jenaj:

1. La honoro de skolto estas ŝtinda. 2. Skolto estas lojala. 3. La devo de skolto estas, esti utila kaj helpi al aliaj homoj. 4. Skolto estas amiko al ĉiu homo kaj frato al ĉiu alia skolto, ne grave de kio laŭ la nacia apartenas. 5. Skolto estas ĝentila. 6. Skolto estas amiko al la bestoj. 7. Skolto obeas ordonojn. 8. Skolto ridetas kaj falas sub ĉiuj malfacilaj cirkonstancoj. 9. Skolto estas ŝparema. 10. Skolto estas pura en pensado, parolado kaj agado.

Kiuj honeste faras sian eblon por plenumi la suprajn leĝojn, tiuj ne povas esti nomataj malbonuloj aŭ militist-emuloj. Tial mi diras, ke la skolta movado estas unu el la plej sinceraj pacocelantaj movadoj, kaj mi plue diras, ke ĉiu Esperantisto, kiu vere volas vidi la realigon de la interna ideo de Esperantismo, tiu devas fari sian eblon helpi al la „Skolta Esperantista Ligo“ disvastiĝi Esperanton inter geknaboskoltoj de la mondo.

Kiuj amas pacon kaj volas helpi al ni en nia glora tasko, tiuj skribu tuj al la Honora Ĝenerala Sekretario, trupestro Norman Booth, MSP., Nether-ton, Huddersfield, Yorkshire, Anglujo.

J. W. Leslie, eks-subtrupestro, Propaganda Fakestro, S. E. L.

meritas alian sorton, tiuj ĉi malsaĝuloj aŭ ŝajnkristanoj! En kiuj ŝtatoj regas vera kristaneco, tie ankaŭ troviĝas tiom da frateco, da oferemo kaj justecemo, ke militoj inter ili ne povas estiĝi!“

Tiamaniere min kristanon instruis la buddhano, kaj, komplete min rigardante, li forlasis min. —

La Feliĉo.

Rakonteto de H. D. Nomborg*.)

Tra la senlima mondo, tra la senfina kosmo flugis anĝelo.

Jam multajn, multajn jarojn ne ripozis liaj flugiloj; jam multajn, multajn jarojn li flugas kaj flugas senĉese.

Ekmarkante le sunon, stelon aŭ vagantan kometon li stariĝas kaj demandas: „Diru al mi, mi petas, ĉu vi ne scias, kie troviĝas la tero?“ Kaj apenaŭ ekaŭdinte la respondon „Ne“, li jam flugas for.

Domaĝe estus pri unu minuto perdita, pri unu sekundo prokrastita!

Antaŭ multaj, multaj jaroj la anĝelo aŭdis pri la mizerego de la malfeliĉaj homoj sur la tero, pri tio, kiel malfacile kaj maldolĉe vivigas tie — kaj lia anĝela koro plenpleniĝis per kompatemo. Tiam li genufalas kun ploro antaŭ la „Trono de Dio“ kaj petis pri la feliĉo por la homaro. Dio favore aŭskultis lian peton kaj tuj al li transdonis la feliĉon, por ke li ĝin alportu al la malfeliĉaj homoj sur la tero.

De tiam li malsuprenflugis de la „sepa ĉielo“ kaj erarvagis inter sunoj, steloj kaj kometoj kaj serĉas ĝin — la teron.

En sia dekstra mano li tenas la feliĉon. Facile moviĝas liaj blankaj flugiloj en la mola zefiro.

*) Eminentia nuntempa juda verkisto.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

En Bardijov (Ĉeĥoslovakio)

dank' al laŭdindaj klopodoj de s-o policestro Zdvoraček, kiu per tagordono rekomendis al siaj subuloj la lernadon de Esperanto, ĵus komencis kurso kun 40 partoprenantoj. Konsiderante, ke la kursanoj estas diverslingvaj (ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj, germanoj), la kursgvidanto, D-ro Austerlitz, sukcese uzante la metodon laŭ Berlitz, instruas sen helpo de iu gepatra aŭ nacia lingvo eĉ al komencantoj nur per Esperanto. Mankas do ĉiu traduko de vortoj, ĉar ĉiu nova esprimo estas klarigata per pririgardigo kaj evidentigado, la abstraktaj ideoj per parafrazo kaj diskutoj. La gelnantoj pli rapide progresas ol ĉe uzo de la tradukmetodo.

Rim. de l' red. Estas interese, ke ĉiam pli kaj pli la rekta metodo estas uzata ankaŭ en Esperanto instruado. Eble pedagogoj interŝanĝos tiurilatajn spertojn, por ke poste ni povu legi interesan artikolon. Strange ekzistas nur malmultaj lernolibroj uzebaj por ĉi tiu speciala instrumetodo.

Esperanto en Pola lando.

BYDGOSZCZ. Kurson inter poŝtistoj gvidas s-o Kronenberg (30 p.).

JAROSŁAW. Vigla propagando des-oj Fischer kaj Dornfeld inter gimnazianoj de 4—7. klasoj. La pri E. interesiganta gimnazidirektoro s-o Rychlik afable disponis la gimnazicambregon por kursoj. Okazas sub inspektado de lerta filologo kaj Esp.-emulo s-o prof. Bodenstein tri kursoj kun sume 40 junuloj. Fondiĝis „Junula Esp. Grupo“, prez.: s-o L. Fischer, del. de UEA, Jarosław, Sławkackiego 9.

KATOWICE. La ĉi tie aperanta gazeto „Volks-wille“ (Voĉo de l' Popolo), plej granda germanlingva socialista gazeto en Polio, estas varblita por Esp. kaj de nun regule ĉiusemajne aperigas Esp. anglon.

LWÓW. Regule raportas pri Esp. sekvantaj gazetoj: Wiek Nowy, Dziennik Ludowy, Gazeta Poranna. En unu el la lastaj kunvenoj de la loka societo „Esperanto“ prelegis s-o Dr. Rothfeld la konatan referaton pri „Medicino kaj Esp.“ de D-ro Blassberg.

WARSZAWA. „Pola Esperanto Societo“, str. Królewska 19., komencis reeldoni „Pola Esperantisto“ n kiel sian neoficialan organon. — La estraranoj de la „Unuiĝo de oficistoj por poŝto, telegrafo kaj telefono en Respubliko Pola“ tre favoras Esp., antaŭ ĉio la sekretario s-o Stan-greclak. Pri la jam foje menciitaj skribaj kursoj, estrataj de s-o Kronenberg en Bydgoszcz, skribis pli ol 60 pollandaj gazetoj. Laŭ komuniko de la estraro de la poŝtista unuiĝo oni provizore bezonas minimume 5000 lernolibrojn. — Same fervora propagando inter fervojistoj de s-o M. Daroszewski. Pri aranĝo de skriba kurso (simile al poŝtista) ĵus anoncis la oficiala fervojista organo „Kolejarz-Związkowiec“.

SIEDLCE. Unu kurso gvidata. Loka gazeto „Gazeta Podlaska“ favore rilatas al nia movado. Dum ĵus okazinta ĝenerala kunveno de „Pola Esp. Societo“ oni elektis prez. s-o Zmuda, sekr. f-ino Hakowska, s-o Cz. Pruski, honora membro de PES.

Pola Esperanto Servo.

POZNAŃ. La lasta monata kunveno okazis 7.10. en la ĉambrego de la „Bauhütte“. La nove elektita estraro konsistas el jenaj personoj: prezidanto s-o pasiro Cezyszski, vicprez. s-o Klusak, sekretario s-o Kapela, vicsekretario f-ino Weselska, kasisto s-o Kalitzke, vickasisto s-o Michalski. Esp. kurso por oficistoj komenciĝis en la urba lernejo (strato Garncarska) kun 35 partoprenantoj. Gvidas instruistoj s-o L. Borkowski, del. UEA. Kaŭze de la deklara datreveno pri la fondo de la „Esp. Societo Poznań“ oni okazigos grandan feston la 12. novembro 1922 je la 7. vespere en la ĉambrego de la „zoologia ĝardeno“. Ĉiuj Esperantistoj en Polujo kaj eksterlandanoj estas kore invitataj. Demandojn direktu al s-o Tad. Kapela, Poznań, Żórawia 19 (Polujo).

Miloj da jaroj jam forpasis, milionajn sistemojn li trafugis — sed neniu scias, kie troviĝas la tero kun sia malfeliĉa loĝantaro.

De tempo al tempo el la okulo de la anĝelo gutetas larmo. Ho, kiu scias, ĉu liaj lumaj flugiloj ne portas lin for de la tero?

Kaj tamen — anĝelo!

Ne pro sia longa erarvagado, ne pro sia sentutila laciĝo li verŝetas larmoguton, sed pro la malfeliĉaj homoj, kiuj tiel soifas kaj deziregas la feliĉon, kiun li, la anĝelo, portas en sia dekstra mano.

„Diru al mi, mi petas, ĉu vi ne scias, kie troviĝas la tero kun siaj malfeliĉaj homoj?“

„Ne.“

Kaj jam li flugas for entuziasmitigate por sia idealo.

Dume la mondo konstante aliĝas. Sanĝiĝas homoj, idealoj kaj religioj — tamen la malfeliĉo regas ĉie.

„De kie ni prenu la feliĉon?“ ĝemkrias la malfeliĉaj homoj.

Foje maljuna astronomiisto observis erarvagan kometon. Longan tempon li ne deturnis siajn okulojn de la teleskopo, kiun li direktis tien, kien ajn moviĝis la kometo. Eĉ manĝante kaj dormante li ne ĉesigis la observadon. Por tiu tempo li starigis sian junan filon sur sian lokon kaj apenaŭ finmanĝinte — li denove observadis per la teleskopo.

La kometon tio tre kolerigis. „Kion deziras de mi tiu maljuna sorĉisto? Ĉu mi estas ŝtelisto, ke oni ne deturnas de mi la okulojn?“ Tamen la astronomiisto plenumis sian devon. La kometo plikolerigis.

Subite alflugas al ĝi la anĝelo kaj demandas per sia malĝoja milda voĉo: „Diru al mi, mi petas,

Esperanto en Estonujo.

XX. Estona Agrikultura Ekspozicio okazis 2.—11. sept., kiun vizitis ĉirkaŭ 32000 homoj. En ĝi estis unufoje elmetitaj Esperantaĵoj de l' Asocio kaj de la kvara trupo de skoltinoj. Oni faris tre bonan propagandon. Multaj lernolibroj estis vendita kaj kelkilo da propagandiloj disdonata.

1. okt. seminariano Robert Cher faris en seminario de Tallinn referaton pri Esperanto. Ĉeestis 30—40 seminarianoj.

Ĉe la unuiĝo „Espero“ en Tallinn fondiĝis piedpilka komando, kiu projektas en estonteco konkuri kun aliaj ĉi tieaj komandoj. La unua konkuro okazis dimanĉon 8. oktobro.

Fondiĝis ĉe la unuiĝo „Espero“ „Debata Rondo“, kiu celas interesiĝi kaj vigligi la sociajn kunvenojn. Kiel prezidanton kaj sekretariojn oni elektis s-ojn A. Suija kaj H. Seppik.

Du kursoj en Tallinn komenciĝis 4. okt., partoprenataj de 68 personoj. Gvidas s-o H. Sakaria kaj s-ino Helmi Dresen. Lecionoj okazas dufoje en semajno en klasoj de 22. elementa lernejo.

Henriko.

Ne ricevitaj numeroj de ET.

Ofte alvenas en nia administrejo petoj, denove liveri iun numeron de ET, kiun „la administrejo ne sendis“ aŭ kiu „ĉe la poŝto perdiĝis“, aŭ — kiun la abonanto perdis (?). Ĝis nun ni ĉiam volonte kaj sen kostoj plenumis tiajn petojn kaj laŭeble ankaŭ en estonta tempo ne volas lasi tiun kutimon. Sed la kostoj ĉiam pli altiĝantaj, al kiuj niaj abonprezoj ne povas sekvi en sama rapideco, devigas nin, fariĝi lom pli ŝparemaj. Ni tial povas senpage postliveri iun numeron nur, se ĝi estos postulata tuj, t. e. se ĝi ne alvenis 1—2 tagojn post la kutima tago de alveno. En aliaj kazoj ni postliveras nur, se mono estos aldonita al la reklamacio, aŭ se ni povas depreni koncernan sumon de la abonkonto. Ni petas niajn legantojn, por estonte ne forgesi tion, ĉar ni ne povas ĉiam denove respondi dezirojn, pri kiuj ni en ET jam faris komunikaĵojn.

Ĉe tiu okazo ni ankaŭ scilgas, ke al regulaj abonantoj ET ĉiam regule estas sendata inter jaŭdo vespere kaj sabato tagmeze, do almenaŭ 1 tagon antaŭ la oficiala dato de l' apero.

Administracio de ET.

Parolejo.

130. Lingvaj Eraroj.

Ĉe la kunidoj de nia ĵus pasinta mondkongreso mi ne povis ne atenti kelkajn malgramatikajn, kiujn ne ĉiam evitis eĉ plej lertaj parolantoj. Plej multe ĝenas la eliso de nia klasike ŝatinda finaĵo de direkto (kaj objekto) la n. Pliie mi ĉiu ke oni preskaŭ senescepte pronuncis la jar-ciferojn kiel fundamentajn nombrojn, dum la severa logiko de Esperanto nepre postulas, ke ili estu ordaj; vidu Zamenhof, Fund. Ekz. § 12 (fund. Kreat § 7), Francier, Esp. Sint. 78 (p. 28). Tiu eraro faras nian bele rondigitan lingvon iom akra kaj kvazaŭ kvarangula. Per irla eraro, certe la malplej grava, oni kelkfoje miksis la sencen de ĉu kaj tiun de se.

H. Bonnevie, Kristiania.

131. Esperantaj Kursoj.

Tute ne estas ĝojinde legi en la gazetoj: komencia la kurso kun 25—50 personoj. Efektive el 50 kursanoj jam post 3—4 semajnoj forkuras e 50% el 25—30% el 10 kursanoj nur e 10% aŭ neniu. La forlasantoj de la kurso por longa periodo perdiĝas... Unue grandnombraj kursoj fariĝas jam post kelke da lecionoj kzerne ŝablone enaj por kazermaniera instruado. Dae por ili estas bezonaj vastaj kaj e multekostaj eloj ktp.

Kontraŭe grupetojn kun e 10 personoj oni povas instrui e en privataj loĝejoj. Al instruantoj estas eble, 4—5-foje dum la leciono interparoli kun ĉiu lernanto, la tutan tempon streĉi la atenton de lernantoj. Oni tute ne rimarkas ocedantojn kaj la instruado estas pli intensa kaj interesa.

Pli rapide la lernantoj kutimiĝas pensi kaj paroli Esperante, pli rapide la gvidantoj atingas la celon. Ĉiu leciono daŭru nur 45 minutojn.

Iu instruanto, kiu gvidas antaŭ 2 grupoj 4 grupetojn.

kometo, ĉu vi ne scias, kie troviĝas la tero kun siaj malfeliĉaj homoj?“

„Sur la tero homoj?“ respondas la kometo kolere, „tie estas nur maljunaj sorĉistoj kaj junaj mortigistoj.“

„Ho, la malfeliĉaj homoj!“ ekĝemas la anĝelo, „ĉio nur pro granda malfeliĉo! Ne, kometo, ne decas koleriĝi, estas peko malami...“

Kaj la feliĉo en lia dekstra mano lumbrilas, ke eĉ la kometo, ĝin rigardinte, pliheligis.

„Kie estas la tero?“

La kometo montris al li per longa dika radio la lokon, kie troviĝas la tero.

„Ho, kia distanco inter la tero kaj ĉielo!“ mallaŭte ekĝemis la anĝelo, „kaj ĉio pro granda malfeliĉo.“

Kaj li tuj forflugis.

Dume sur la tero la astronomiisto ekrimarkis la anĝelon kaj vidis per la teleskopo brilantan objekton en lia dekstra mano. Kaj ĉar profeto jam de longe antaŭdiris, ke alflugos anĝelo kun feliĉo, la astronomiisto tuj konjektis, ke nun tiu anĝelo alportas la feliĉon por la homoj.

La gazetaro disvastigis la ĝojigan informon tra la tuta mondo.

„Alflugas anĝelo kun feliĉo,“ oni rakontis ĉie, kie ajn troviĝas homaj buŝoj.

Ĉiuj stelobservistoj vidis klare per siaj teleskopoj, ke la anĝelo pli kaj pli proksimiĝas al la tero. Ili komencis kalkuli, kaj fine elkalkulis, ke en tiu kaj tiu tago, en tiu kaj tiu horo, en tiu kaj tiu minuto, sur tiu kaj tiu grado, la anĝelo ekstaros sur la tero.

Kiam alvenis la fiksita tago, kunarigiĝis homoj el ĉiuj landoj sur la interkonsentita loko.

Fariĝis grandega amaspuŝado. Homoj prepuŝis unu la alian, malpacis, vangofrapis... kaj fine oni komencis reciproke intermortigadi sin.

Konkurso por infanoj.

Ĝis nun 74 infanoj estas premilitaj. S-o van Heek plialtigis la premion ĝis 750 gmk; sed li premios nur tiujn infanojn, kiuj per aldonita atesto de instruisto pruvos, ke ili mem sen helpo de aliaj personoj skribis sian leteron aŭ rakonton.

Listo de libroj elektotaj.

(La prezoj, kiuj estas nedevigaj, entenas la sendkostojn.)

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof... 100 gmk.
Andersen, Bildolibro sen bildoj... 80 gmk.
Argus, Pro kio?... 170 gmk.
Avsejenko, Fraŭlino Suzano... 80 gmk.
Raabe, La nigra galero... 150 gmk.
Seidel, Vintro-fabeloj... 110 gmk.
Moebusz, Dokumentoj de Esperanto... 170 gmk.
Lessing, Minna von Barnhelm... 80 gmk.
Bennemann, Tra la mondo I... 150 gmk.
Bennemann, Tra la mondo II... 250 gmk.
Goethe, Hermano kaj Doroteo... 150 gmk.
Fricke, Universala Legolibro... 140 gmk.
Brüggemann, Unua kaj dua legolibro (kune)... 70 gmk.

Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg, Germ.

Gazetaro.

L'Indépendant (Perpignan), 9., 11. okt., artikoloj pri Esperanto.
Głos Nauczycielski (Voĉo Instruista), n-oj 14-15, kun la „Manifesto al la instruistaro tutmonda“.
The Bath Herald, Saturday, 7. okt., kun artikoloj pri Esperanto.
Le Télégramme du Nord-Est, Reims, 4. okt., longa artikolo pri Esperanto.
La Montagne, Clermont-Ferrand, 18. sept., artikolo pri Esperanto.
La Onde, Toulouse, sept., artikolo pri la XIV-a.
L'Égalité, Villeneuve-St. Georges, 25. sept., favora artikolo pri la politikistaro — kontraŭuloj de Esperanto.
Le Journal du Crenot, Le Crenot, 7. sept., pri la XIV-a.
L'Intérêt Public, Cholel, 3. sept., pri subteno de Esperanto de la urbestro.
Le Temps, 1. okt., laŭdo de la Ministra cirkulero.
Le Journal de Vienne, Vienne, 16. sept., pri la XIV-a.
Le Moniteur Viennois, Vienne, 16. sept., pri la XIV-a.
Le Crenotin, Le Crenot, 6. sept., pri la XIV-a.
Le Bulletin de l'Association Française de Professeurs des langues vivantes, sept., favora artikolo kontraŭ la Ministra cirkulero, subskribita „Esperantisto“.

Novaj prezoj.

La daŭra kreskado de ĉiuj kostoj devigas nin denove plialtigi kelkajn prezojn. Post la 1 nov. abononj kostas

por aŭstroj kr. 800.—
por hungaroj kr. 30.—
por poloj mk. 120.—

po numero. Alvenantaj antaŭ la 1. nov. mendoj ĝuas ankoraŭ la ĝisnunajn prezojn.

Administracio de ET.

Recenzejo.

LIBROJ.

KOMPLETNY PODRECZNIK języka międzynarodowego Esperanto de Leon Turno. 11: 14 1/2 cm. 79 pp. Havebla ĉe Leon Schleichkorn, Kraków, Długa 15 (Polujo).

Se oni komparas la liston de polaj lernolibroj, nuntempe haveblaj, kun tiu de germanaj, oni konstato, ke en Polujo ekzistas tre malmultaj lernolibroj. Ĉi tiu manko de haveblaj lernolibroj en Polujo ofte sentiĝas, ĉar ne ĉiu kursgvidanto havas saman guston kaj metodon. Pro tio la samideano en Polujo sendube kun ĝojo salutas la aperon de nova taŝga lernolibro. Ĉi tiu lernolibro, aranĝita laŭ 16 lecionoj, pro sia lerte kompilita enhavo certe trovos multajn uzantojn. Ni povas rekomendi ĝin al ĉiu.

GAZETOJ.

Germana Esperantisto, okt.
Katolika Mondo, n-o 4.
The British Esperantist, okt.
Holanda Esperantisto, 12. okt.
Corriere Balcanico-Esperantista, 30. sept.
Esperanta Ligilo, sept. El la enhavo: Neoficiala raporto pri la Dua en Helsinko. — Stranga mensogo, de Therese Rackova. — Literatura konkurso. — Pri franca kongreso porblindula. — Libera korespondo. — La germana Esper-

Riveroj da homa sango fluas sur tiu loko, kaj la ĝemado kaj kriado de la agoniantoj levigis ĉielon.

La anĝelo vidis de supre, kiel la homoj premege kaj puŝegas unu la alian, kaj per siaj lastaj fortoj li de supre krlis:

„Ne batu unu la alian! Mi havas feliĉon por vi ĉiuj, por ĉiuj!“

Sed ili ne aŭdis.

Kiam la anĝelo atingis la teron kaj liaj lumaj okuloj ekvidis la trapikitajn agoniantojn kaj la homan sangon, kaj liaj oretoj ekaŭdis la ĝemadon kaj kriadon — ruliĝis larmo de liaj okuloj kaj falis sur la feliĉon.

Kaj de tiu tempo la luma feliĉo makuligis.


Oni rakontas, ke la anĝelo, kiu estis mortlaca pro la longa kaj peniga vojo, kaj pro tio, kion liaj okuloj vidis sur la tero — eksvenis kaj la feliĉo falis el lia dekstra mano...

El la juda lingvo tradukis J. Jurysta.

Diversaĵoj.

Alkoholfabrikado el ligno.

La alkoholo, tre grava ilo por ĉiusepacaj industrioj, ĉefe estas fabrikata el greno kaj terpomoj. Sed jam dum multaj jaroj, precipe en Usono, oni uzas ankaŭ lignon, tamen la fabrika maniero ne estis tre gajniga ĝis nun. Tial oni esploris novajn metodojn precipe dum la monda milito, kiam oni bezonis pli multe da alkoholo ol antaŭe. El 100 kilogramoj (=kg) da seka ligna substanco oni ricevis ĝis nun mezkvante 6 litrojn da alkoholo pura (=100-procenta=alkohol absolutus), sed eĉ 10—12 litrojn, se oni uzis nemiksitajn abian segfarunon. Uzante miksaĵojn de segfarunoj abiaj kaj fagaĵ, eble eĉ malsekaj, oni certe ne atingas



Ejo de Petrograda Societo „Espero“, Petrograd, Fontanka 17.

Staras: Prezidanto de Sovjetlanda Esp. Unuiĝo (SEU), s-ano Ernesto Drezen.

Sidas: Prezidanto de Petrograda Societo „Espero“ (fondita 1891), s-ano Aleksandro Pilev.

anta vortaro por blinduloj. — Je kio sopiras vi, poemo de K. Topelius, tradukis Nilsson.
Krom tio la gazeto enhavas reliefe presitan geografian karton de Eŭropo.

AFIŝOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

WEGWEISER für Unterricht und Fortbildung in Esperanto. Granda afiŝo lerte kompilita de nia samideano Schade en Wien, atentiganta la publikon pri la okazantaj Esp. kursoj en la diversaj partoj de la urbo. La afiŝo montras al ni, ke ekzistas grupoj kaj okazas kursoj en 21 distriktoj de la urbo.

Leterkesto de ET.

M. R. Formla. 10 liroj alvenis.
J. H. en Gärte. Ĉeko pri sv. kr. 25.55 ricevita.
J. K. en Luck. Pri adreso demandu abonejon.
C. R. en Negotin. Sumo alvenis. Ĉu ET nun alvenas?

Enciklopedia Vortaro

Esperanta-Germana, d.: Eugen Wüster

eldonota de la firmao Hirz & filo, Leipzig. Ĉi tiu verko, enhavonta proksimume 1200 paĝojn estas la plej grava scienca entrepreno Esperanta, eldonata de la komenco de nia movado.

Ĝi estas verko, kiun ĉiu Esperantisto germana kaj negermana devos posedi. Por propagandistoj ĝi estas verko, kiu konvinkos eĉ la plej skeptikajn sciencistojn pri la valoro de nia lingvo por sciencaj kaj teknikaj laboroj ĉiusepacaj. Por ĉiuj Esperantistoj, kaj precipe por instruistoj kaj verkistoj ĝi estas plej valorinda libro de referencoj. Ankaŭ ĉiu grupo devus ĝin posedi en sia biblioteko.

La Enciklopedio konsistas el du partoj: a) 160 paĝoj de teksto — havebla laŭvole en la Esperanta aŭ germana lingvo — prikribas la tutan Esperantan movadon de ĝia komenco kaj ĝian literaturon de la apero de la unua libro de D-ro Zamenhof ĝis la tago, kiam la Enciklopedio aperos. b) Ĉirkaŭ 1000 paĝoj de alfabetaj informoj: plena vortaro kun ĉiuj ĝisdatitaj teknikaj (multe el ili alie ne haveblaj) pro nia apero en malaperintaj gazetoj aŭ libroj, detala pritrakto de gramatikaj finaĵoj, prefiksoj kaj sufiksoj kun karakterizaj ekzemploj plej ofte elĉerpitaj el la verkoj de la Majstro, klarigoj koncizaj pri ĉefaj organizaĵoj kaj specialaĵoj de la movado, ekr. Akademio, Lingva Komitato, CO, UEA, Speamilo, Homaranismo, ktp.

La teknikaj vortoj kaj esprinoj estonte elpensotaj kaj uzotaj aperos de tempo al tempo kiel Periodaj Suplementoj, tiel, ke la verko mem neniam malnoviĝos.

La verko aperos en 7 sinsekvaj kalendaroj. La unua kalendaro povas esti eldonata, kiam la eldonejo ricevos almenaŭ 500 antaŭmendojn ĝis la fino de la nuna monato. La gesamideanoj estas do petata, sendi kiel eble plej rapide sian mendon. Kiu ne ankoraŭ konas la aranĝon de la vortaro, estas petata, demandi de la eldonejo propekton kun specimenaĵoj kolumnoj. Li tuj konvinkigos, ke la enhavo de ĉiu kalendaro estas tiom grava kaj ampleksa, ke la demandita prezo tute ne estas alta. Ĝia nun ni Esperantistoj ne konis tian gravan Esperanto-verkon.

La prezo por la unua kalendaro estas por samideanoj kun malbona valuto 1 usona dolaro kaj por tiuj el bonvalutaj landoj 3 usonaj dolaroj.

Oni estas petata, sendi kun la mendo la monon. Ĉar la eldonejo asertas, ke en okazo de neapero ĝi resendos al la antaŭmendantaj la monon. Oni do nenion riskas, tuj transsendante al ĝi la antaŭmendon kun la dirita sumo.

tiom da litroj. Sed la fabrikado de 6 litroj da alkoholo el 100 kg da ligno estas tamen ekonomia, ĉar tia alkoholo kostas nur 21 cts., male la grenalkoholo 30 cts., se monate 100000 gajonoj produktataj. Do la nova fabrika metodo, nun uzota en Germanujo, estas des pli ekonomia, ĉar krom alkoholo oni gajnas akcesorajn produktaĵojn da tiomaj kvantoj ĝis nun ne atingitaj, kies valoroj estas pli grandaj ol tiuj de la alkoholo mem ĉe normalaj valuto-rilatoj. Ĉi tiu elligna alkoholo, se bone purigita, enhavas nenian malutilajn substancojn, ekzemple ankaŭ ne la metilalkoholon, kiu ja estas tre danĝera al homa saneco ĉar kaŭzante blindigon. Eĉ oni diras, ke la kruda alkoholo fabrikata el ligno estas pli pura ol la kruda alkoholo el terpomoj, sukerorapoj aŭ melaso.

Otto Marquard.

Kial?

Al E. A. F.

Regas nokta silenta ripozo...
Nokta vento, agraba kaj mola,
Aromadon alportas de rozo...
En ĝardeno vagadas mi sola...

En ĉielo ploregas la steloj...
Plaŭdeblas en lago ondet,
Ploras noktoj, zumbante, libeloj,
Kaj betulojn ekkaptas tremet'...

Kial ploras hodiaŭ naturo?
Ĉu ne tial, ke ploras la kor',
Koro mia sub akra murmuro
De reganta min kruda angor'?

Ĉu ne tial ondeto plendplaŭdas,
Ke ne venas amata al mi,
Ke ŝi vokon de l' amo ne aŭdas,
Ke por ŝi jam mi iĝis neni'?

Vadim' Obrazcov, Kazan.

Hebreaj Esperantistoj kaj Esperantaj Eldonistoj

La propagando de Esperanto inter hebreoj iras malrapide pro manko de lernolibroj en lingvo kaj hebra lingvo. Ni havas nun okazon liveri mal-kare kelkilojn da lernolibroj en lingvo kaj antikva lingvo hebra, de konata aŭtoro Haneĉ Neimanoviĉ.

Mendojn akceptas la Esperanto-Oficejo „Renoma“, Warszawa, Marszałkowska 91.

ESPERANTO KOMERCISTA GRUPO

Dresden-N., Hauptstrasse numero 38.

Plej granda Esp.-komerca entrepreno serioze laboranta, perdas ĉiun komercan aferon. Postulu nian plej novan ofertilon kun multaj Esp.-lingvaj prospektaj, ni rekomendas speciale ludilojn, manikojn kovrajn, pantalon-porfoliojn, ŝubindilojn, kartonaĵojn, kalendardorsojn, murbildojn kaj tiel plu.

Specialaĵo: „Speton“-rimedo, grava por virinoj! Specimentabuleto 100 mk.

Holandaj Esperantistoj!!

La Anonima Societo Centra Esperanto Librejo estas juna entrepreno, en 1919 fondita de Esperantistoj por Esperantistoj.

Ĝi celas la vendadon de Esperantaj libroj kaj propagandiloj je moderaj prezoj.

Ĝi meritas vian plenan atenton, ĉar ĝi estas la termometro de nia movado en Holando.

Ĉu vi scias:
ke la vendado ĝojige kreskas;
ke nia provizo de libroj estas pli granda ol 6000 verkoj;
ke la kapitalo estas dividita en malgrandaj personaj akcioj po f 10.—;
ke la dividendo de 1919 estis 6 1/4%, de 1920 7%, de 1921 6%.

Se vi ne havas tempon akribi ĉiusemajne bonan artikolon pri Esperanto en la gazetaro;
se vi ne kapablas fari lan efikan propagandon;
ĉiam vi simple povas kunlabori kun ni, kiuj diavasligadas Esperanton per la vendado de lernolibroj, literaturo, propagandiloj ktp., mendante unu aŭ pli da akcioj po f 10.—, partoprenante tiamaniere en la

Anonima Societo „Centra Esp. Librejo“
Bankastraat 2a. Poŝtkonto: H. 19480, Hago.

Malmultekostaj donacoj delikataj

La hungaraj artaj manbrodaĵoj,

puntaj tuketoj, broditaj koloraj tukoj, kusentukoj, virinaj mansaketoj, ledaj mansaketoj kaj viraj monujoj kun balilkoloro, pupoj nacvestitaj manfaritaj, kaj koloraj skatoletoj tre plaĉis dum la kongreso en Helsinko!

Por bonvalutaj landoj malmultekostaj kaj belaj donacobjektaj! Specimenkolekto por 20 sv. fk. aŭ egalvaloro. Ekzempleroj haveblaj de 3 sv. fk. Taŭgaj por revendado. — Mono sendota antaŭe! — (Per tiu manlaboro subtenas sian vivon nun multaj hungaraj sinjorinoj kaj fraŭlinoj! Per mendo vi do helpas ankaŭ ilin). Mendojn adresu al la delegito de Budapeŝto Paŭlo Balkányi, VI, Hajos u. 15., Hungarlando. La fremduloj vizitante Hungarlandon ĉiam aĉetas multajn tiasecajn objektojn!

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du aŭ tri ekzempleroj) kostas po du enprezoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.40 leno, 0.80 hfl., 1 nord. kr., 1 sil., 1 svia. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 2 esk., 8 lr., 6 kc., 7 rmk., 10 din., 18 lej., 18 lev., 120 gmk., 130 hung. kr., 600 pmk., 4000 adair. kr. Ĉiu povas pagi per la silo el la nomiala valuto, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp.-kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomiala, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonanto, de aliaj ni enprezas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭe pli, bilkiĝo. — Adiraĵoj mobilitejn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, bilkiĝo. — En specialaj el eksterlandaj numeroj specialaj prezoj.

NASKIĜO, Al gesinjoroj A. Perrin en Melun (Francujo) naskiĝis filo Paŭlo-Ludoviko.

FIANCIĜO. F-ino Marie Drost kaj s-o Alfred Meyer-Kiratin en Nürnberg fianĉiĝis.

EDZIĜO. S-o Ernest E. Yelland, anglo, prez. de Londona Esperanto Klubo, edziĝis kun s-ino Theresa Sufadinova, rusino. Familia lingvo nur Esperanto.

EDZIĜO. S-o Theodor Oster kaj f-ino Mariha Daniel ge-edziĝis en Godesberg.

EDZIĜO. Samideanoj kaj amikoj de s-o Virginio Langier en Torino sendas pro lia edziĝo, al li kaj al lia edzino gentila, s-ino Irata Ferrari mil bondezirojn kaj... multajn virajn florojn!

MORTO. Moris s-ino Aloisie Čánská, edzino de s-o Václav Čánský, en Nusle (Ĉeĥoslovakio), fida amiko de ET.

ĈIU IDEKONSCIA ESPERANTISTO legu „La Nova Epoko“! Prezente tiron de intermita kultur-literatura almanako, ĝi ne enprezas materialon kun pasanta intereso. Tiel ĉi kajero de „La Nova Epoko“ estas ĉiam freŝa kaj nova. Aperis n-o 1 kaj 2. Postulu ĉe la eldonejo (1-a Tverskaja-jamskaja ŝ., lg 5, Moskvo-Rusio), sendante per mobilitejo sumon egalvaloran al afranko de eksterlanda registrita letero por ĉiu numero. Abonkondiĉojn rigardu el ET n-oj 103-106.

28-JARA FRAŬLO deziras interkorespondadi kun serioza fraŭlino por pli posta edziĝo. Adreso: S-o M. Maciejowski, (ĉe Kruzycyński), Bydgoszcz, Św. Trójcy 12e (Polio).

EL

Svislando, Grand-Britujo, Francando

ni bezonas ankoraŭ **anoncojn** por la Nürnberg'a numero.

Oni rapidu varbi!

Kapablaj reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.



Unuakvalitaj
Ŝtaloĵoj de Solingen:
Raziloj, Razaparatoj, Razilklingoj, Poŝtranĉiloj, Tondiloj, Hartondiloj, je fabrikk-prezo.
Bildoj kaj originalaj specimenoj haveblaj.
Perado per
Komercista Esperanto Grupo
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14.
Aldonu al demando respondkuponon.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe Henri J. Carels.
50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.
Luntejo Carels
(ĉefo: H.A. Scharwächter)
65 Welmarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Esperanto Service Corporation

„Esko“
500 Fifth Avenue New York City
Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiusecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke ricevatel.

Jus aperia
necesa por propagando kaj kursoj,
Kompletny Podręcznik
języka międzynarodowego
Esperanto
Verkita de Leo Turno
72-paĝa kun antaŭparolo de Bronisław Kuhl
La prezo 250 pol. mk.
Al mendantoj de alm. 25 ekz. konvena rabato.
Ricevebla nur post antaŭa pago.
La adreso:
Leon Schleickorn, Kraków, Pol., Długa 15.
Postulu pŝkasan transpagilon.

LA SENLINGVULO

estas ankoraŭ ricevebla.

295-paĝa romano, plena de interesaj okazintaĵoj.

Prezo (inkluzive sendkostoj)
por bonvalutuloj 320.— gmk.
(aŭ 1 svia. fk.)
por mezbonvalutuloj 200.— gmk.
por malbonvalutuloj 160.— gmk.

Butin & Jung, Godesberg, Germanlando
Poŝtĉeka konto Köln 92036.

Importo. Eksporto.
Pollanda Komerca Agentejo
Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoj; donas ĉiujn informojn pri :- la polaj komerclokoj. :-

Nur pograndaĵoj firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

TORINO (Italio). Depost la 1. sept. „Esperanto Triumfonta“ estas vendata ĉe la kiosko de ĵurnalvendejo en Placo Castello angulo strato Via Roma pro intereso de la Torino Esp. Asocio, kiuj baldaŭ malfermos novajn kursojn en la publikaj lernejoj.

GRAVA INFORMILO por ĉiu korespondanto kaj kolektanto! BES-a Adresaro. Nova, kvara eldono. Prezo 1.50 svia. fk. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 150 mk. afrankite. Tula sendado post pago. Havebla ĉe Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg (Germ).

PREZIDANTO de ASTRAĤANA SOCIETO ESPERANTISTA, Astrahani, Armjanskij most 111, G. Artemjev, Rusio, deziras korespondadi kun tuta mondo letere ĉiam ke ricevas helpapermonon, mondĵurnalojn, muziknotojn (prefere operoj), il. poŝtkartojn, fotografiojn de gesamideanoj, Esp. librojn kaj aliajn Esperantajn kaj specimenojn de komercaĵoj, katalogoj, prospektaj por Komercista Oficejo. Interŝanĝo sendos suprenomitan, ankaŭ pm. kaj ĉiujn deziratajn. Deziras aboni por 1923 naciajn Esp. ĵurnalojn. Rekomencos per ĉio dezirata. Unue ne sendas. Por respondo aldonu respondkuponon. Sendu registrite!

LINA BALETISTINO (21-jara) petas pri alsendo de modal, ilustr. ĵurnaloj de sezono 1923 jaro, artaj kaj artistaj ĵurnaloj. Sendu rekomendite! Reciproke mi sendos rus. sovjet. poŝtkartojn, mian fotografon aŭ ion alian laŭ dezire. Volonte korespondos. F-ino Lussi Valkovskaja, Bobrujsk. Min. gub., Socialistiĉeskaja 198, Ruslando.

ARTAJN METALLABORAĴOJN, originale manoforgitajn, speciale artajn brotojn el laŭno aŭ kupro eksportas H. Petermann, Schwerte (Ruhr) Wesif., Hagenerstr. 6, Germanujo. Specimenon per rekomendita sendaĵo kontraŭ 1 dol., 4 svia. fk., 9 fr. fk., 3 nord. kr. aŭ sil. aŭ samvalora valuto en naciaj mobilitejoj. Specialajn ofertojn pri buŝtukaj ringoj, cindrujoj ktp. kontraŭ resp. kupono. Korespondado: germane, Esperante, angle, france.

SERIOZEGAJ POLAJ FABRIKISTOJ rekomendas profite al pogranda eksporto: malkarajn korbmeblojn, fadenajn bulonojn por loĵoj (manlaboro), tapiŝojn, flankkurtenojn ktp. Informdono: Prof. Miecz. Sygnarski, Bydgoszcz, Kordeckiego 19, Wielkopolska (Polujo).

„DANA ADRESEJO“ por komercio, industrio, reklamo ktp. informas pri ĉiu afero, kontraŭ respond-kupono. — Lendorff, Dybbölsgade 55, Kopenhago B.

AVERTO. Japana Esp. Komercista Korporacio en Jokohama kaj s-o Panajot Kolev en Sofio estas repetataj pagi por antaŭ unu jaro liveritaj rozoleo kaj poŝtkartoj. [lv. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden-A 16, Germanio.]

POR NOVA ARTIKLO mi serĉas ankoraŭ lertajn, solventajn reprezentantojn en Hol., Sved., Balistikatoj, Turk., Egipt., Pers., Sud-, Mezameriko kaj Meksiko. Fritz Mayerhauser, Bad-Reichenhall, Germanujo.

Korespondado kaj Interŝanĝo.

S-o Galliano Dolce, Udine (Italio), Via Asilo M. Volpe 27, deziras interŝanĝadi poŝtkartojn kun la tutmondo.

S-o H. J. Jones, 72 Bovill Road, London SE 25., Anglujo, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), precipe kun Hispanoj kaj Japanoj. Ne interŝanĝas poŝtkartojn.

S-o Kurt Knorr, Königsberg i. Pr., Rosenstr. 21 a, (Germ.) deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj per poŝtkartoj aŭ leteroj.

Mi deziras korespondi letere kun ĉiuj, pri vitaminoj, naturanigadoj, religio, kaj interŝanĝi Esperantajn, fotografiojn, vidaĵkartojn ktp S-o Nestor Lindholm, Paimio, Finn.

S-o Jaro Heffels, Helmeec, župa Zemplin, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtkartojn kun ĉiulandanoj.

S-o Richard Oesterreicher, Wien V, Embelgasse 31, Aŭstrujo, deziras korespondi kun la tuta mondo; interŝanĝas poŝtkartojn.

S-o Giovanni Azzola Ferdinandsberg, Bánát, Rumanio, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiulandanoj (koresp. Esperante kaj itale).

Frieda kaj Herta Gruber, Reichenberg, Robert-Blumstrasse 15, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiulandanoj.



Se vi serĉas livelejojn por ĉiusecaj komercaĵoj kaj industriaĵoj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksportkapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO
FREIBURG I. BR. (GERM)
KATHARINENSTR. 14

kiu havas bonajn rilatojn al germanaj industriaĵoj kaj komercaĵoj rondo. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp.-kup.


Risku malmulte, por ke vi povu gajni multe!

KLASLOTTERIO.

Jaroslav Koloušek, Hradec Králové, 485. Ĉeĥosl.
Anonca oficejo. — (Proksime de pedagogia Inst.)

Posteno kiel infanvarietato serĉata por nepre fidinda 43-jara fraŭlino. Bonegaj referencoj. Mian adreson bonvole sendas f-ino F. Mrkvicková, Hradec Králové 811, Ĉeĥoslovakio.

Lustroj el Kristal-vitro



en ĉiuj stiloj kaj grandoj, elektraj aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

Ernst L. Hettichnachf.
Freiburg i. Br.
Germ., Rheinstr. 60.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 54.
Belgia: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 98420.
Brazilo: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgaria: Georgi Fr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenu.
Estona: Est. Esp. Unuĝo, postkaŝto 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Francja: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latvia: Tālvado Indra, Rīga, Pasta kastele 478.
Litova: Pablu v. Medem, Smeltu g-vė 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestijn Jr., v. Aarssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝtĉeka konto Haag n-o 2878).
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 8128). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkonto n-o 630.
Sveda: Förädlingsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Poŝtkartojn, monerojn, papermonon interŝanĝas kun ĉiulandanoj Jan Rux, Bydgoszcz, Paderewskiego 6 (Polando).

S-o Ed. Strecker, Bydgoszcz, Berlińska 36 (Polio), deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj. Interŝanĝas ankaŭ poŝtkartojn.

Konstanty Chmielewski, librigo, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1a, volas interŝanĝi polajn poŝtkartojn pogranda (de 200 ĝis 1000 aŭ pli) laŭ katalogo. Sendu nur nedifektitajn.

S-o Francisco Kéder, Ujpest, Nyár u. 73, Hungarlando, deziras nur poŝtkartojn interŝanĝi, sed nur kun aeriozaj flatelistoj ĝis 300 pecoj!

Kvar amikinoj: f-ino Germaine Engels, St. Vincentiusstraat 67, f-ino Eugénie Engels, St. Vincentiusstraat 67, f-ino José van Looveren, Lange Slachterijstr. 117, f-ino Jozefina Braeckmans, Lange Slachterijstr. 97, ĉiuj el Antverpeno (Belgujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per leteroj kaj poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn.

S-o Lidiard, Maidenhead, dankas ĉiujn respondintojn; bedaŭras ke liaj kursoroj ne povas korespondi kun ĉiuj (70 respondas); sendas troajn adresojn al aliaj kursestroj.

Fraŭlo Josef kaj f-ino Maria Schwarz deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun la tuta mondo; ankaŭ interŝanĝas poŝtkartojn kaj Esperantajn. Gladbeck i. W., Rosshaidestr. 66, Germanio.

S-o Hans Jäger, teknikisto, en Werfen (provinco Salzburg), Aŭstrujo, deziras korespondadi prefere kun fraŭlinoj el la tutmondo.

S-o Erich Richter, flatelisto, Breslau i. Schlesien, Schillerstr. 28, Germanujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtkartojn (bfl.) kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Aleks. Hristoff, Bukovci (Rahovsko), Bulgario, deziras korespondi.

Argentino. — S-o Manuel Noelle Güell, General Arsenales F. C. P., deziras korespondadon kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Interŝanĝas leterojn, poŝtkartojn kaj poŝtkartojn.

Fraŭlo Josef Roman Scherer, Villa Mattenhöfeli, Kriens, Svislando, 22 jara, amanto de fotografarto deziras korespondadi letere kaj per poŝtkartoj ilustr. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj speciale kun slavlandanoj.